

Turangio 45 Luko

EN TIU NUMERO VI LEGOS :

Juanita Turbillon P. 1 kaj 2
rakontis kiel ŝi iĝis
esperantistino.

Alain Boué estas P.3 kaj 4
aktiva membro de
la « Restoracioj de
la koro ».

Jean-Louis rakontas P.5
bretonan
legendon kaj
donas la parolojn
de bela kanto.

Franca kaj Pino P.6
jam rakontis pri la
terura tertremo,
kiu detruis sian
regionon. Hodiaŭ
temas pri rekons-
truo.

Jane tradukis P.7
paĝon de libro de
J. d'Ormesson.

Jane klarigas al ni P.8
kial la Anglio stiras
maldekstre de la
stratoj ?

Varmigu vin per P.8
bona supo. Re-
cepto proponata
de Jeannine kaj
Gérard.

Mi pardonpetas pro la mal-
frua apero de nia gazeto.

Kiam mankas artikoloj, estas
malfacile plenigi 8 paĝojn !

Jacques Gaumé

Centre Culturel Esperanto-Touraine
Halles de Tours, place G. Paillhou
37000 TOURS
esperanto-touraine37@wanadoo.fr



Esperantaj Hazardoj

Mi malkovris Esperanton en 1949. En Junio, mi sukcesis en la "Brevet élémentaire" kaj feriiis ĉe la patrino, post pluraj jaroj en pensiono. Ni loĝis en malgranda vilaĝo, kie estis nek naĝejo, nek biblioteko, nek klubo por junuloj. La promenadceloj estis belaj kaj nombraj sed ne variaj, apud la rivereto en kiu la trutoj povis trankvile vivi, ĉar ilia kapto ne interesis min.

Mi serĉis en la ŝranko de mia plej aĝa frato, mortinta jam de pluraj jaroj, dum la milito*. Mi trovis rufian broŝureton "Esperanto".

Mi ne komprenis tiun vorton. Foliumante ĝin, mi mire malkovris, ke estas lingvo. Mi jam studis plurajn lingvojn, do la afero tuj interesis min.



Tri lernolibroj eldonitaj inter la du mondmilitoj.

La malnova broŝureto, kiu datiĝis de 1905, amuzis min dum la ferioj. Ĝi estis sufiĉe kompleta, kaj enhavis markojn por sendi la korektotajn ekzercojn al Parizo. Ĝi estis eldonita de la firmao "Hachette", kun informoj pri la francaj esperantistaj kluboj kaj aĉetebraj libroj. La gramatiko estis koncize sed klare prezentita.

*Temas pri la 1a mondmilito

En la tradukaĵoj, anstataŭ banalaj frazoj, estis tekstoj simplaj pri "Eo kaj la latina", "Eo kaj la naciaj lingvoj", "Historio de Eo". Mi lernis ke Zamenhof loĝas nun en Varsovio, pri la apogo de Tolstoj kaj la bedaŭrindaj sekvoj, pri la fiasko de volapuko, tiu "malbela, neparolebla, malfacila, ridinda parodio de lingvo, kiu ne povis longe daŭri". Tiu libreto eĉ parolis pri la unuaj provoj en 1878. Sed eĉ ne unu vorto pri Klara ! Ĉion tion mi povis facile legi ĉar estis glosaro ĉe la fino.

Nun, mi pensas ke estis bonega propagandilo. Ĝi bone efikis sur min, kaj mi deziris plu scii. Mi ne povis skribi al la adresoj, kvardek jarojn kaj militon poste, do mi serĉis, ĉar mi estis "alkroĉita". La profesoroj, en la lernejo, ne konis Esperanton kaj iom primokis min.

Kelkajn jarojn poste, mi aŭdis pri Esperantaj kursoj en la radio. Mi tuj skribis sed estis tro multekoste por mi. Oni petis de mi tutan monatan salajron de novbakita instruistino. Do, mi momente rezignis kaj atendis ankoraŭ dum jaroj. Fine, en 1964, en la sindikata gazeto, mi legis ke Esperanta ekspozicio okazos en la biblioteko de Tours. Mi ne maltrafis ĝin. Tie, mi renkontis S-ron Ribot, kiu, vidante mian entuziasmon, donacis al mi multajn paperojn en Esperanto, eĉ libreton, kaj proponis al mi staĝon, monaton poste, en Andernos. Imagu, miaj unuaj veraj ferioj, kaj plue, Esperanto ! Mi entuziasme partoprenis la kursojn. kaj bone sunumis ĉe la maro. Mi konatiĝis kun aliaj esperantistoj, kaj plue certe plej grave por mi, S-ro Ribot parolis pri Grésillon, kiu situas nur 25 km for de mia vilaĝo.

Pro tio, la sekvantan jaron, mi tuj, ĉe la ekvido, mi enamiĝis al nia kastelo kaj tre ofte vizitis ĝin.

Multajn jarojn poste,vespere, iu S-ro Captain el Nederlando, rakontis ke, kun aliaj junuloj, ili iris piede al Hispanio ĉeesti iun renkonton, prelegante pri Esperanto. kaj vendante broŝuretojn survoje. Mi pensis : Nederlando, Parizo, Hispanio,Tours estas survoje kaj mi preskaŭ certas ke li vendis la broŝureton al mia frato, kiu estis. aviadisto, apud la RN10. Ĉu ne mirinde ?

Juanita

Verkita okaze de la
Greziljona « Verko
Semajno 2006 »
(29/04-6/05)

*Teksto proponita de
Dominique, homaĝe al
nia kara Juanita for-
pasinta la 17an de
Aŭgusto 2017*



La kulturdomo de ESPERANTO en kiu vi povos partopreni en diversaj stagxoj (vidu la adreson : <http://www.gresillon.org>)



Hodiaŭ, nia « luko » malfermiĝas sur la Frateco, kaj en tiu bela pejzaĝo, tie, korflanke, ni ekvidas la « Restos ». Ni ĉiuj opinias scii kio estas la « Restaurants du Cœur » : jes, estas asocio laŭ la leĝo de 1901 fondita de Coluche en 1985. Ĝia celo estas helpi, kaj volonte asisti la senajn ulojn, interalie en la nutra kampo, per aliro de senkostaj manĝoj, kaj per partopreno en ilia sociala kaj ekonomika enkonduko, kaj en ĉiu ago kontraŭ la malriĉeco, kian ajn formon ĝi alprenu.

Estas ankaŭ ĉiu jaro populara kanta spektaklo titolata « les enfoirés » (la bastardoj ?), kaj nacia kolekto da nutraj produktaĵoj en supervendejoj, printempe, kaj alia aŭtune, pri la lernejoj provizadoj.

Jen la « montra fenestro » de la Restos.

Sed konkrete, proksime al via hejmo, en Indre-et-Loire (departemento 37), en via urbo, eble eĉ en via kvartalo, kion faras tiu asocio ?

Jen kelkaj respondoj :

Aktuale, en nia departemento « Indre et Loire », 6 000 personoj profitas de la Nutra Helpejo. Por tio, ili aliras unu aŭ du foje semajne en unu el la 19 centroj en la departemento 37. Tiu helpo mobilizas proksimume 450 volontulojn kiuj dediĉas parton el sia libertempo por disdoni 1 000 000 da manĝoj, ekde la 1a de januaro ĝis la 31a de decembro. Ili konsistas el produktaĵoj, kiujn oni devas kuiru hejmen. La personoj kiuj alvenas en niaj akceptejoj estas senkondiĉe akceptataj, ekzistas neniam aprioro. Sed, por profiti el tiu Nutran Helpon, la demanduloj devas pravigi siajn vivrimedojn. Efektive, la konfido kiun la donantoj faras al ni trudas pli bone uzi iliajn donacojn. Do, la enskribo fariĝas sub kondiĉoj. Baremo estas fondita ĉiujare de la nacia administracia konsilio de la « Restos », kaj estas laŭ tiu baremo ke volontuloj speciale formitaj por tiu ofico, atribuas manĝojn al ĉiu familio kiam la kondiĉoj estas respektitaj. Tiu kontrolo estas farita du foje jare ; la unua komence de la somera kampanjo martomeze, kaj la dua komence de la vintra kampanjo novembromeze.

La disdonitaj nutraj produktaĵoj : lakto, fruktaj sukoj, freŝaj legomoj, ladskatoloj por entreoj kaj ĉefpladoj, freŝa aŭ frostigita viando, fiŝaĵaj konservaĵoj, ovoj, fromaĝoj, laktaĵoj, desertoj, keksoj, panoj, nutraĵoj por beboj, ... devenas de du distingeblaj fontoj :

- La « Restaurants du Cœur », al la nacia nivelo, kiu sin provizas per eŭropano mono.
- La semajna kolektado farita ĉe kelkaj partneraj supermerkatoj.

En « Indre et Loire », ĉiu jaro, tiuj du fontoj konsistas el 850 tunojn da nutraĵoj al kiuj oni devas aldoni en 2017, 118 tunojn el la Nacia Kolektado. Tiu lasta kolektado kiu daŭris 2 aŭ 3 tagoj laŭ la partneraj magazenoj mobilizis 1 500 volontulojn, tio estas 1 050 plie ol kutime. Vi probable preterrenkontis iujn el ili inter la 10a ĝis la 12a de Marto 2017.

La « Restaurants du Cœur » senkoste proponas « Laborejojn de la franca lingvo » al personoj kiuj deziras tion sub la sola kondiĉo ke ili estu pli ol 17 jaraĝaj. Estas tri Laborejoj en la 37, en Joué-lès-Tours, ĉe Tours-Febvotte, kaj alia en Tours-Europe. Ĉirkaŭ kvindeko da lernantoj vizitadas ilin. Estas personoj devenintaj el diversaj landoj, por kiuj la franca lingvo estas fremda lingvo, kaj kiuj deziras rapide akiri facilecon en nia lingvo por pli bone integriĝi. Ni akceptas same personojn kiuj preskaŭ neniam enlernejigis, aŭ eĉ apotekistinojn, kuracistojn, inĝenierojn ... Tiuj tempoj estas okazo por la volontuloj valo-

rigi iliajn lernantojn, memfidi ilin, kaj provi forgesigi kelkfoje doloritan pasintecon.

Kelkaj akceptejoj disponas de « vestejojn ». Estas aranĝitaj lokoj por stoki purajn kaj decajn vestojn, donitaj de privatuloj aŭ ofertitajn de famaj markoj. Tiel, senpagi, la profituloj povas digne prezentiĝi ĉe la administrejoj aŭ la dungontoj.

La « Restos » ankaŭ proponas al la registritaj personoj siajn bibliotekajn enhavojn. Estas libroj, bildrakontoj, revuoj, magazinoj, ĵurnaloj ... donacitaj de oferemaj donuloj, aŭ de lernejoj dokumentadaj oficejoj, aŭ ankoraŭ de Domoj de la Kulturo.

Frizosalonoj estas ankaŭ malfermitaj por ĉiuj kiuj, ekzemple, sin prezentos por dunga interparolado. Tiuj frizosalonoj, senpagaj, funkcias per rendevuoj. Ili ebligas al la senmonuloj konservi aspekton kiu ne elperfidas la malfacilojn kiujn ili frontas.

La kinejoj « Studios » kaj la « CGR » de Tours proponas seĝojn por privataj projekcioj, al kiuj la profituloj de la « Restos » rajtas ĉeesti. La interesataj personoj ricevas po unu inviton, ili prezentiĝas al unu el du kinejoj la interkonsentitan tagon, kaj la organizantoj kolektas la invitojn. 843 kinamantoj profitis de tio en 2016.

La 21a aranĝo de la giganta « Pot au feu » (bolita bovaĵo) okazis la 11an de februaro 2017 en la haloj de Tours. Tiu manifestacio estas organizata de la urbodomo de Tours helpe de la komercistoj el la hala kvartalo. La tutaj profitoj de la vendoj estas transigitaj al « Restaurants du Cœur ». En la supermerkato « Les Atlantes » kaj ankaŭ en aliaj supermerkatoj, en decembro, vi eble pakigis aĉeton de volontuloj el la « Restaurants du Cœur ». Tiu servo da pakdonacoj, kies sumo estas forlasita de via taksado, donas ĉirkaŭ 15 000 € al la « Restos ».

La asocio « L'École buissonnière » (malserioza lernejo) bazita en Ligueil, proponas spektaklojn en la regiono de Loches. La profitoj estas transigitaj al « Restaurants du Cœur ». La 100 volontuloj kiuj konsistigas ĝin, el kiuj 25 komediistoj kaj kantistoj, donacis 6 kvalitajn spektaklojn al pli ol 4 000 spektantoj en 2016.

- La « Restaurants du Cœur » el 37 administras du projektojn da enŝovado en laboro :
- Tiu de « loĝistiko », al la sidejo, en la merkatego de Rochepinard, kiu ŝarĝas la liveradon de la centroj de distribuo el la departemento 37.
- Tiu de « legomkultivado », en komunumo Avoine, kies produktaĵo estas aldonita en la centroj. Tiuj strukturoj nune ebligas al 20 personoj repreni kontakton kun la aktivecojn. La metilernado de povoscio de laboro pere de gestoj kaj kutimoj, en medio malpli devigita ol tiu de la entrepreno, trankviligas kaj valorigas la partoprenantojn donante al ili fortan senton da socia utileco.

De la fino de novembro ĝis la 23an de decembro, la « Restaurants du Cœur » kolektas novajn aŭ nedifektitajn ludilojn, pluŝojn, tabul-ludojn, librojn, lumdiskegojn, figuretojn, videoludojn, biciklojn ... por la operacio « nenia Kristnasko sen ludiloj ». Volontuloj mobiliziĝas staciplace en Tours kaj en la centroj de distribuo el la departemento 37. Poste ili organizas redistribuon de ĉirkaŭ 5 000 ludiloj jare al la infanoj de plej malfavoritaj familioj La nutra helpo estas la ĉefa aktiveco de la « Restos ». Sed, krom tio, kio estas prezentita ĉi-supre, ni havas la okazon akompani profitulojn en la malfaciloj, kiujn ili frontas, kiam ili petas tion de ni . Tiu socia klopodo, implicita, estas tre favora por memfidi. Kaj por ni, la volontuloj, estas okazo por riĉaj interŝanĝoj, kie ni povas tute esprimi nian Fratecon.

Antaŭ ol refermi nian « lukon » sur la « Restos », ankoraŭ kelkaj vortoj :

Se vi disponas iom da libertempo, ne hezitu kontakti nin. Ni proponos al vi postenojn rilatajn kun viaj kapablecoj kaj viaj deziroj. Tiel, nia sekretariejo akceptos vin al 02 47 47 03 78 de lundo ĝis vendredo, inter la 9a kaj la 12a. Oni kalkulas je vi !

Alain Boué

LA ŜLOSILO KAJ LA PINTO DE LA TURO

Dum la Pluezekaj Internaciaj rekontiĝoj 2017, mi partoprenis en la kurso de bablantoj pri legendoj.

Pro tio, kiel la aliaj partoprenantoj, mi rakontis legendon pri « la ŝlosilo kaj la pinto de la turo ».

Hodiaŭ vi povas ankoraŭ vidi tiun turon en la maro tuj apud la plaĝo de Brehec, tre bela plaĝo en la norda parto de Bretonio. Tiu stranga turo indikas la pinton, kiu estas tre danĝera por ŝipoj. Ĉar tiu marbordo de Pempolo ĝis San Briego, entenas en 2017 krutaj klifoj.

Oni diras, eĉ nun, estas **trezoro** en la turo, sed por atingi ĝin, ne estas tre facila, ĉar estas tre stranga pordo.

Plurfoje, pluraj personoj trafis plonĝi, sed ili ne sukcesis trovi tiun pordon. Kelkaj, oni diras, trovis ĝin sed ili ne sukcesis malfermi la pordon, ĉar mankas **ŝlosilon**, specialan ŝlosilon. Ili serĉis ĝin, malfeliĉe ne trovis ĝin ĝis nun !

Sed Bretona poetino kiu nomiĝas **Anĝela Duval** verkis poemon en la bretona lingvo pri tiu temo uzante simbolismon, dirante ke, fakte, la tresoro elvokas la kulturon de Bretonio, kaj por eniri en tiu turo, oni bezonas ŝlosilon. Tiu ŝlosilo estas la Bretona lingvo !

Poste, esperantistino el PLuezek, **Hélène Caous**, fratino de Jeanne Pouhaer kaj Marie Eon, adaptis tiun poemon al la Esperantista movado, kaj kreis kanton, kiu nomiĝas « La ŝlosilo », el la bretona « an alc'houer aour » (= la ora ŝlosilo).

Jean-Louis Le Brizault

Jen La teksto de tiu kanto :



La ŝlosilo

Se volas vi vojaĝi, tra la vastega mondo,

En liber' kun fremduloj, la lingvo estas lim'.

Ne timu montru vin do, trovu metodon simplan :

Per ĝi ja tuj vi puŝu ĉiujn perantojn for.

Refreno :

Serĉu ŝlosilon, serĉu ŝlosilon, serĉu ŝlosilon amikoj

Lernu la lingvon ĉar per esperanto

La pordon malfermis nun ni.

Se estas vi maljuna, sen lertec' kaj sen mono,

Ne ploru plu pri la vivo, kiu malmolas plu ;

Se vi amikojn volas tra tuta la planedo,

Per esperanto skribu, vivos libero nun.

Lingvo de ĉiu lando, estas trezoro vera,

Ĉiu popolo sur tero, sin ŝirmas por la viv',

Se volas vi paroli, interkompreni vin do,

Tro forte ne cerbumu, jen esperanto ja.

Lasta refreno :

Al mi respektu, ilin respektu,

Al ĉiuj lingvoj respektu,

Per esperanto, nenies regado,

Egalas nun ĉiuj en mond'.

Evolua restaŭrado danke al kontribuo de Francio

Okaze de la tertremo, kiu en la jaro 2009 detruis L'Aquila-n, la ĉefurbon de mia regiono (Abruco), kaŭzante pli ol 300 viktimoj, mi skribis etan artikolon por la legantoj de "Turangĝia Luko". Tiam mi neniam estus imaginta ke mi devos ankoraŭ trakti pri la sama maltrankviliga temo. Bedaŭrinde aŭguste kaj oktobre ĉi jare la "monstro" reaperis, trafante ĝuste la koron de Italujo: la najbarajn regionojn de Abruco kaj ankoraŭ ĝiajn vilaĝojn.

Inter multnombraj sciigoj disdonitaj el TV kaj ĵurnaloj pri la ĉagrenoj de la suferanta popolamaso, frapis min pozitiva sciigo, kiu koncernas la kurantan rekonstruon de L'Aquila.


Dum la 7-Grupo Rendevuo en 2009 la ĉefaj potencoj promesis konkretan monhelpon. Francio plenumis la promeson, donacinte € 5,5 milionojn por la restaŭrado de Preĝejo de Sanktaj Animoj, kun baroka fasado, kiu, kvankam ankoraŭ enkaĝigita, montras sian imponon sur la ĉefa placo.

Oni aŭguras ke la aliaj potencoj sekvu la francan ekzemplon por kontribui redoni al la urbo la antikvan noblan aspekton kaj la iaman viklecon.

Artikolo sendita de Franca kaj Pino Lalli (la italaj amikoj/korespondantoj) de Jacques.



La AKVO



Pli familiara kaj pli prezenca ol aero ĉiam forestanta, la akvo estas pli stranga kaj pli paradoksa. Ĝi havas nek formo nek koloro sed ni povas vidi ĝin. Ĝi emisias nenian sonon, sed ni volonte aŭdias sxia muziko kaj sxia plendoj. Ni penetras kelkfoje en ĝia neversxajna teksturo, sed pli ofte estas ĝin kiu penetras nin por setli ĉe ni kie ĝi regnas tiel amantino. Laŭ ĝia formo tiel malkonstanta kaj sekreta ĝis al la miraklo ni donas la nomo de « likvido »

Sendaŭra kaj nekonstata materio, sen la eta dolideco ĝi ne prezentas nenian reziston, la akvo estas tamen tre kapabla, en sia kole-ro, detruo kaj mortigi. Ĝi estas fonto kaj kondicion de tuta vivo kaj, kiel la aero, kaj pli ol la aero, ĝi estas mortiga, mal pacienca de frapi kaj semi la morton.

Potencigebla murdisto, la akvo estas ankaŭ ĉarmulino, ĉiam ekrideta kaj ludi kun ni. Ĝi amikiĝas kun la homaro la firmaj rilatoj kaj amemaj ligoj. Mi amegas ĝin multe, kaj, en la somera triumfo, mi

ofte kantis ĝian grandon kaj ĝianjn ĉarmojn.

Ĝi reĝas sur la geografio, sur la historio, sur la antropologio, sur la biologio. Ĝi falas el ĉielo. Ĝi sxprucas el la tero, ĝi tegas la pli granda parto de nia planeto kies ĝi sekurigas la vivon, la potencon kaj la gloron.


La kontinentoj, la havenoj, la ebenajoj kies ĝi trapasas kaj akvumas, la komerco, la sano sxuldas multe al ĝiaj povoj. Laŭ la nomoj de oceanoj, maroj, golfoj, golfetoj, krekoj, de riveregoj kaj de riveroj kaj lagoj, ĝi forĝis tion ke ni estas antaŭ de elkrui kontraŭ niaj sxipoj, niaj marbordoj, niaj rikoltoj, niaj marbordadomoj la timindegaj minacoj.

La homoj neniam ĉesis ĵetiĝis al ĝin kriante de feliĉaj krioj kiuj konservis en la historio kaj ke la infanoj ludante en la sablo ripetis ankoraŭ. Ili neniam ĉesis timi ĝin, tiom kiom la draĝoj, la marapopoloj, la turkoj, aŭ tiun peston kies ĝi uzis longe de ilo kaj de transporto.

Tutaj urboj, sxtatoj, kulturoj, civilizacioj devis al ĝi preskaŭ tute. Ĝi estas origine de nombraj metioj, de grandaj pasioj, de plezuretoj, de senmortaj mirlaboroj. Ĝi inspiris maristojn, poetojn, pentristojn, amantojn, historistojn, asekuristojn, brulajn kapojn, aventuremulojn. Ĝi estis kaj estos la fonto de multaj sonĝoj, konkeroj kaj de militoj. Ĝi konfuzas kun la mondo kaj kun nia vivo kies ĝi permesis la naskiĝon kaj la kreskon. La akvo ! La akvo estas diino pli potenca ol imperiestroj kaj reĝoj kiuj devas al ĝi ilia riĉaĵo ; ol la tutaj civilizacioj kiu, el la « Tigre » kaj « Euphrate » ĝis Danubo kaj ĝis Nilo, kaj el la Mediteraneo, nia interna maro, al terura oceano, konstruiĝis ĉirkaŭ de ĝiaj povoj ; kaj, same kiel en tutehomoj kiuj ekzistas nur per ĝi, kun ĝi kaj dank'al ĝi.

Jane tradukis la paragrafon « La Akvo »

(el la libro de Jean d'Ormesson : « Guide des égarés » ed. Gallimard.



Oni ofte sin scivolas kial la brituloj konservas kutimon veturi maldekstre (kiel la tutaj francaj trajnoj faras, cetere, hodiaŭ). Klarigon donis Angloj. Ĝi valoras tiel valoras. Malnovtempe, kie kavalerianoj renkontpasis ilin sur voje, tiuj-ĉi portis




la spadon je la maldekstra flanko kaj okazis ke preterpasante galope sur la vojegoj, la spadoj kunbatiĝis kaj donis okazon de kverelo.

Do, oni decidis ke la kavalerianoj cirkulu sur la maldekstra flanko de la vojo. Tiamaniere liaj spadoj ne povus kunbatiĝi.

Legita en antikva ĵurnalo, kies nomon oni forgesis

Jane



Kukuma supo por 4 personoj

1 aŭ 2 kukumoj

3 terpomoj

1 blanka cepo

1 bukedo da mento

1,5 l da legombuljono aŭ bovbuljono, (mi uzas kubojn Maggi)

15 cl da kremo.

Pecetigu la kukumojn, la senŝeligitajn terpomojn, la cepon.

Metu en kaserolon.

Aldonu 1,5l da akvo kaj 3 kubojn aŭ 1,5l da legombuljono.

Boligu kaj kuiru ĝis la malfirmeco de la ingrediencoj.

Miksu la tuton kaj aldonu la kremon.

Pecetigu la mentfoliojn kaj aldonu al la antaŭa preparaĵo.

Lasu malvarmiĝi kaj poste konservu en fridujo.



Jeannine kaj Gérard Layseman